

Mesaĝo de Paco kaj Bonvolo 2016
De
La Junularo de Kimrio al la Junularo de la Mondo

Elekto kaj Konscienco

Ni ne havas instrukciojn pri kiel krei pacon, sed ni kredas je la ĉisekvaj fundamentoj:

Paco estas montri respekton.
Paco estas senti sin sekura.
Paco estas unueco.
Paco estas...
Vi decidu.

Antaŭ cent jaroj, dum la Unua Mondmilito, viroj inter 18 kaj 41 jaroj estis devigitaj militservi.

"Vi ne havas elekton!"

Por iuj, sia konscienco montris ke batali estas malĝusta.

Ili do kreis elekton por si mem. Kontraŭstari.

Kontraŭstari estis si mem batalo, sed ili kredis je paco kaj elektis pacon.

Ne estis facila decido, sed estis kuraĝa decido.

Aktuale, necesas ke ni estu kuraĝaj kaj atentaj nian konsciencon.

Konstruante muron, ĉiu briko valoras; konstruante pacon, ĉiu elekto gravas.

Do...

...ni elektas montri respekton.
...ni elektas helpi unu la alian.
...ni elektas preni respondecon.
...ni elektas akcepti ĉiujn homojn tiel kiel ili estas.

Ĉu vi konstruos kun ni?

Verkita de la gimnazianoj de Ysgol Uwchradd Maes Garmon, Mold, Kimrio.